

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protoktantaĵoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gill Noria, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank-kaj fabrikk-  
direktoro, Kaunas.

**N-o 164**  
**4. 11. 1923**

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung  
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)  
Esperanto Triumfonta  
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldona  
ala al ĉiu specimena kaj unua numero  
de nova abono.

**Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa**

## Nederlandanoj kaj svisoj aŭskultis je Esp. parolado radiotelefona, farita en London.

### La XI-a Japana Esperanto-Kongreso malhelpita pro la tertremo.

Dum tuta Eŭropo estas furioza fajrujo politika, la tekniko progresas senhalte, kiel pruvas la jeno:

S-o P. Merchant en Sheffield, la fame konata prezidanto de la Brita Esperanto Asocio kaj prezidinto de la Komerca Konferenco en Venezia, laŭ invito de la Brita Esperanto Asocio la 20-an de oktobro faris ĉe la Londona Radiotelegrafika Stacio senfadenan paroladon pri kaj en Esperanto. Ĝi estas la unua radiotelefona parolado fluspeca en Anglujo.

La saman tagon dektri nederlandaj samideanoj laŭ iniciato de fervora samideano s-o J. Ravestein, del. UEA en s-Gravenhage, faris ekskurson al la Nederlanda Radio-Industrio en tiu ĉi urbo, por aŭskulti la paroladon.

Precize je 19.15 h. la ĉeestantoj aŭdis klare la parolojn de s-o Merchant. Oni tre ĝojis, kiam la oratoro salutis radiotelefone la samideanojn en Belgujo, Francujo kaj Nederlando kaj certigis, ke Esperanto triumfos.

Ankaŭ la gesamideanoj, kunvenintaj en Bern por la Ĝenerala Kunveno de Svisa Esp. Asocio, aŭskultis kaj bone komprenis la paroladon de s-o Merchant.

Duan fojon oni uzas helpilon de moderna tekniko por akceli nian movadon. Estas dezirinde, ke ankaŭ en aliaj landoj oni imitu la ekzemplon. Jen vidigaĵo la praktika aplikeblo de Esperanto inter anoj de diversaj lingvoj.

### La Esperanto-parto de la parolado de s-o Merchant.

La legantojn de ET sendube interesos la Esp. parto de la parolado de s-o Merchant. Lia temo estis „Esperanto, la sola kuracilo por lango-ligita mondo“.

Kiel la titolo montras, lia parolado — kiel kutime — estis sufiĉe humora kaj ŝerca, pro tio, ke la parolado okazis je sabato vespere, kiam oni kutime ludas dancmuzikon. Jen liaj paroloj en Esperanto bone komprenitaj de la nederlandaj samideanoj:

Miaj karaj samideanoj!

En la nomo de la tuta brita Esperantistaro mi salutas vin tutkore hodiaŭ kaj esperas, ke miaj vortoj, dissendataj je la nuna momento por la unua fojo el Anglujo per la senfadena telefono, atingos viajn orelojn klare kaj plenigos viajn korojn per ĝojo.

Mi esperas, ke la rezultato de la eksperimento estos tiel granda, ke la sendado de novaĵoj en nia kara lingvo fariĝos ĉiutage afero.

Por helpi tion, bonvolu sendi al la oficejo de la Brita Esperantista Asocio poŝtkarton, por ke mi povu prezenti al la Senfadena Telefona Kompanio bonan ateston, ke Esperanto estas vivanta kaj potenca lingvo kaj tute taŭgas por la disvastigo de gravaj novaĵoj tra la tuta mondo.

Mi salutas la gesamideanojn en ĉiuj regionoj de la mondo, kaj al la britaj ĝeamikoj, kiuj faris specialajn aranĝojn, mi sendas miajn tutkoraĵojn bondezirojn kaj esperas, ke mi sukcesis kontentigi ilin per mia unua parolado per la senfadenaj ondoj.

Mi salutas la gesamideanojn, kiuj kunvenas hodiaŭ en Bern, kaj esperas, ke la aranĝoj de ili faritaj por min aŭdi bone sukcesos.

Nia movado senĉese pligrandiĝas rilate fortecon, influcon kaj entuziasmon, kaj se ni nur daŭrigos niajn klopodojn yigle, pacience kaj kuraĝe, post nelonga tempo — mi estas certa —, ke ni atingos nian celon en gloro.

La tempo je mia dispono jam forflugis. Tial mi devas saluti vin per la vortoj: „Bonan nokton, karaj ĝeamikoj! Ĝis la revido!“

\* \* \*

Tuj post la parolado s-o H. A. Epton, la aranĝinto, ricevis poŝtkartojn kaj leterojn ne nur el ĉiuj partoj de Britujo, sed ankaŭ el aliaj landoj, ekz. Francujo, Holando, Svisujo, Danujo ktp. Ĉiuj diris, ke ili aŭdis la paroladon tre klare, kaj ke la Esperantaj vortoj estis tute kompreneblaj.

Ni esperas, ke ĉiuj personoj, kiuj aŭdis la paroladon, speciale tiuj kiuj loĝas ekster Britujo, tuj skribu rekte al la British Broadcasting Company, 2 Savoy Hill, Strand, London W. C. 2, kaj petu, ke ili aranĝu pluajn Esperantajn paroladojn. Se multaj personoj tiel skribos, tio plej certe influos la kompanion. Oni skribu nacilingve kaj Esperante.

B. E. S.

### Ĝenerala Kunveno de Svisa Esp. Societo en Bern, 20-21. oktobro 1923. La „senfadena“ saluto.

Sabate, 20. okt., ptm. je 15—18.30 h., la Ekzamena Komitato en lerneja ĉambro aranĝis ekzamenojn. La „Ateston pri Lernado“ akiris s-o D-ro Spielmann, Bern, kaj la „Superan Diplomon“ ĉiuj ĉeestintaj kandidatoj. Ili estas: f-ino Bachmann, Zürich; s-o Bolliger, Bern; s-o Egg, Baden; s-o Hammer, Zürich; f-ino Kapfer, Bern, kaj s-o Scherrer, Luzern.

Vespere antaŭ la fasado de „Bürgerhaus“ okazis lumbilda prezentado, kiun atentis tiel la publiko kiel ankaŭ la Esperantistaro. La lasta lumbildo anoncis, ke tuj, t. e. je 20 h., en „Bürgerhaus“ estos aŭdebla parolado per telefono senfadena de London, kiun aranĝos s-o John Merchant el Sheffield.

Baldaŭ la Esperantistoj enirintaj en la domon aŭdis paroladon, unue angle kaj poste ĝis la fino Esperante, finiĝantan per saluto kaj bondeziroj por la Svisa Ĝenerala Kunveno.

Poste sekvis la laŭprograma amuzo vespero. Alterne je muzikaj prezentadoj sinsekvis prologo en Esperanto de knabino, alparolo de s-o Schmid de la Bern'a grupo, sciigante, ke la federala konsilanto s-o D-ro Haab bonvolis akcepti honoran prezidantecon de la kunveno. Deklamado de la „Espero“ de 11-jara knabino estis aplaŭde akceptata. D-ro Privat kiel prezidanto de Svisa Esperanto Societo en franca kaj Esperanta lingvoj faris paroladeton. Teatraĵeto „La paperulo“ amuzis la ĉeestantojn. Orkestreto de tri blindaj samideanoj certe meritis la plej grandan laŭdon pro la belega violonludado. Post 25 h. dancado komencis kaj daŭradis ĝis 3 h. matene.

Dimanĉe, 21. okt., je 9 h., la gesamideanoj denove renkontiĝis en „Bürgerhaus“, kie okazis la ĝenerala kunveno. Estis malfacile, fini ĝis tagmezo la grandan laboron de la tagordo.

La protokolo de la antaŭjara ĝenerala kunveno estis unuanime akceptata.

La raporto de la Centra Komitato montris la ĝojigan fakton, ke la membraro ĉiam plinombriĝas. En 1921 la societo kalkulis 187, en 1922 256 kaj en nuna jaro 350 membrojn. Dum la pasinta societa jaro okazis multaj paroladoj propagandaj por Esperanto, precipe de sinjoroj Spielmann, Perlet kaj Schmid. Altiĝis al S. E. S. tri novaj grupoj.

La konferenco de Venezia partoprenis 42 svisoj, tiel ke Svislando okupas la trian lokon de partoprenintaj landoj.

Kiel en la antaŭa ĝenerala kunveno proponite, dum 1925 okazis kelkaj intervizitoj de grupoj.

La raportoj de la Centra Komitato kaj de la kasistino kaj kaskontrolantoj akceptiĝis.

Fondo de speciala propaganda kaso estis malakceptata, ĉar S. E. S. ja estas propaganda societo, kaj ĝia kaso jam estas tia.

La Centra Komitato kun sia prezidanto unuanime reelektiĝis.

La jara kotizo por 1924 restas la sama.

Por 1924 oni organizis gazetervonon, kiu funkcios jene: La Centra Komitato Esperantlingve verkos artikolojn; samideanoj en la germana, franca kaj itala partoj de la lando tradukos ilin nacilingven kaj sendos ilin al la grupestroj kaj izoluloj por aperigo en la lokaj gazetoj.

La prezidanto raportis pri UEA kaj la Konstanta Reprezentantaro, kaj la kunveno unuanime akceptis rezolucion konfirmantan la elekton de la K. R. kaj de la Centra Oficejo.

En la sekvinta traktato estis komunikataj la nomoj de la kandidatoj por la ekzamenoj de sabato.

Post finiĝo de la oficiala parto de la kunveno la ĉeestintoj agrable ĝuadis la komunan tagmanĝon, dum kiu reprezentanto de la Internacia Oficejo por la Protekto de la Indigenoj kaj unu el la unuaj pioniroj de Esperanto en Svisujo, s-o Jean Borel, salutis la ĉeestantaron.

Post la tagmanĝo la kongresanaro kolektiĝis apud la federala palaĉo por fotografado, kaj poste parto el ili promenadis laŭlonge de la Aare-rivero ĝis la vilaĝo Muri, kie ili gaje kaj babiladante kunsidis en manĝejo. Baldaŭ kelkaj devis veturi aŭ piede iri Bern'on por tie atingi la diversajn vagonarojn, kiuj ilin ree forkondukis al diversaj regionoj de Svislando. Por la en Bern restintaj gesamideanoj estis ree donita okazo, renkontiĝi vespere en „Schweizerhof“.

Alego.

La redakcio de ET estos tre dankaj pri konc. kaj raportoj el tiuj lokoj, kie la parolado ankaŭ estas aŭskultita.

## Dekunua Japana Esp. Kongreso en Okajama.

De la 31-a aŭgusto ĝis la 2-a de septembro okazis en Okajama la Dekunua Japana Kongreso. Plu ol sepdek delegitoj el Tokio, Sendai, Hiroŝima, Osaka, Kobe kaj aliaj najbaraj distriktoj partoprenis. Ankaŭ amikoj el Korzo kaj Aŭstralio ĉeestis. La kongreso sukcesis bonege. La 30. aŭg. okazis antaŭkongreso en Osaka kaj komuna marvojaĝo al Kioto estis projektiita post la kongreso. Dum la kongreso okazis la terura tertremo, pri kiu jam estas raportita en ET n-o 156. Sekve de ĝi la kongreso estis fermata la 2. septembro. La eksterbaj samideanoj kaj precipe tiuj de Tokio restis en Okajama por atendi novaĵojn. Ĉar dum forsendo de tiu ĉi raporto la telegrafa kaj fervoja interkomunikigo ankoraŭ estis interrompita, neniu sciis ion pri la sorto de siaj familioj. Oni timas, ke la granda, valorega biblioteko de la Japana Esperanto Instituto bruliĝis. Oni konjektas certe, ke ankaŭ la sola eldonejo de Esp. libroj en Tokio „Nippon Esperanto Sya“ pereis, ĉar ĝi troviĝas tie, kie plej forte furiozias la natur-potenco.

Malgraŭ tio la japanaj Esperantistoj ne perdos la kuraĝon.

Jositajo Okamoto,  
Komitatano de Japana Esperanto Instituto.



# Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciiĝojn (sur postkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne interadministral aŭ privataj sciiĝoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado, kondiĉoj, raporte, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

## Landoj.

### Francoj.

**Beauvais.** La 25. okt., la ĉefsekr. de „Esperanto et Commerce”, ing. Deny, laŭ invito de la prez. de la grupo de Beauvais, s-o Demarcy, parolis pri Esp. kaj komerco en la ejo de la Komerc. Cambro de Beauvais, sub la honora prezido de Senatano, Noel, prez. de la Komerc. Cambro kaj efektiva prezido de s-o Loisel, ĝia vic-prez. Sur la estrado estis s-o deputito Desvroux, urbestro, kaj M. Communeau, prez. de la Turisma Asocio. Kurso en la urbdomo.

**Dijon.** D-ro Diard, eksprez. de la grupo en Le Creusot, nun loĝas tie ĉi kaj komencis propagandon kun s-ino Pefit.

**Juvisy (Seine).** La 29. julio, post parolado de s-ano Lescipier, fondiĝis grupo dank' al la agado de s-o Pley.

**Le Van s (Ardèche).** Dum lia somera ĉeesto en ĉi tiu malgranda urbo, s-o G. Chavet faris paroladon en la urbdomo la 15. aŭgusto.

**Mâcon.** La 25. junio, en kongreso de sciencaj societoj de Bourgogne, raporto pri Esp. estas prezentita de ĉefingenierno Moissenet.

**Marseille.** Vigla propagando inter doganoficistoj de samideano Bonnyare, doganrevizisto Dank' al li la Komitato de la Sindikato de Doganistoj en julio rekomendis Esp.

**Montmorency.** La grupo estas oficiale enregistrita. La prez. s-o Amalire.

**Narbonne (Aude).** „Pacamo”, Esperantista Ofice'o, 20. 10. 23. Deleĝitaj pri la federacio, la fratol Lech, dum la lasta semajno, iris al Narbonne kaj interrilatis kun la sola Esperantista en la urbo, D-ro Gouzy.

Propagandaj artikoloj aperis en la ĵurnaloj en Narbonne. La fratol Lech vizitis ankaŭ en Fleury d' Aude (18 kilometroj de Narbonne) s-on Bourjade, malnova Esperantisto, kiu estas preta por doni sian helpon.

Ni petas la Esperantistajn organizaĵojn sendi propagandilojn al sinjoroj: Gouzy, 7 Rue Caboul en Narbonne; Amoureux, Banque Nationale de Crédit, Narbonne; Bourjade, Propriétaire, Fleury d' Aude.

**Paris.** La 18 oktobro paroladis D-ro Privat el Genève. Oni informas nin, ke antaŭ ne longe mortis la edzino de lia bedaŭrinde tro frue mortinta samideano Prof. Bourlet. Samtempe oni anoncas la morton de eminenta franca ĵurnalisto s-o Emanuel Beer je la 10. oktobro. Sendita de l' „Figaro” en Paris en 1906 al la kongreso de Boulogne por moki la Esperantistojn. Li revenis amiko de nia lingvo kaj verkis entuziasmajn artikolojn. Maltrankviligis ĉiujn cirkoŝtanojn li restis amiko al Esperanto kaj publikigis ankoraŭ seriojn da artikoloj, inter alie rimarkindan artikolon okaze de la morto de nia majstro Zamenhof en 1917.

— Dum la somero la Centra Ofice'o havis vizitojn de multaj fremdlandaj kaj francaj s-anoj, inter kiuj s-o Drummond, prez. de l' Aŭstralia Esp. Asocio; Allen, profesoro de franca literaturo en la universitato de Toronto.

— Dum bankedo de lerintoj de la Politeknika Lernejo, nia s-ano Kolonelo Filloux, nun teknika direktoro de „Corderies de la Seine”, parolis ni Esp.

— Dank' al la agado de la francaj grupoj, en la tuta lando estas kolektitaj multaj adrecoj de komercistoj uzantaj Esp., kiuj estos presataj kun stelo en la konata komerca ĵarlibro „Diet-Botijn”, kiu enhavas kvinlingvan vortaron (ankaŭ en Esp.).

— Scienco. Ni erare presigis la distingon de Profesoro Bergonié en la Radiotelegrafio anstataŭ Radiologio (radioj Roentgen).

— France-Esperanto. Ĉi tiu vigla organo de francaj Esp., lerte gvidata de s-o de Mènil, farigas la oficiala organo de la Societo „Esperanto et le Commerce”, kiu presigis tie ĉiun komunikojn kaj abonigos ĉiujn membrojn. Ankaŭ, lerte, la regionala federacio helpas al ĝi kaj, tiamaniere, France-Esperanto farigas la vera speculo de nia movado en Francujo, kiun ĉiuj francaj samideanoj devas subteni.

## La izola arbo.

De A. Aharonjan\*).

Kaj ekĝemis la giganta arbo sub la fortegaj battoj de l' hakilo: „Hal!, hal!...”

La mano de la lignohakisto paraliziĝis kvazaŭ glaciĝinte, la hakilo restis minace pendants en la aero, kaj per sia brila klingo ĝi ridetis al la helaj radioj de l' suno, kvazaŭ ĝi mokus la kortuŝantan krimon de la vundita arbo. La homo estis ŝtoniginta kaj pala, la levita hakilo ne falis, la bato ekhaltis tremante en la aero. La hakisto aŭskultis, kun streĉitaj okuloj; li rigardis antaŭ sin: ĉu vere la arbo ĝemis kaj ploris? Ĉu efektive ĝi plendis: „hal!, hal!...”

La vundo kaŭzita al la radikoj de l' arbo estis larĝa kaj profunda, kaj el ĝi pogute elfluis la vivo de la maljungeo giganto.

La arbo larmis kaj ĝemis, kaj ĝiaj larmoj esitis jen ruĝaj, jen klaraj.

Ĝi ploris sango-larmojn, ĝi deziris vivi. Estis miraklo, ierura miraklo!

\* Avelis Aharonjan estas eminenta persono en la moderna armena literaturo. Li naskiĝis en la jaro 1886 en la vilaĝo Igdir. Lia patro ĉiam penis fari siajn infanojn bonaj kaj sinceraj. Kaj en tio li sukcesis: la tuta distrikto komis la familion Aharonjan por ĝia boneco. Unuajn paŝojn en la klereco la malgranda Avelis faris hejme, sub la kontrolo de sia abata patrino, kiu multe helpis al la estonta verkisto per siaj koraj kaj sinceraj rakontoj. Superan instruitecon li ricevis en la universitato de Lausanne (Svislando) de 1898 ĝis 1902. Poste li veturis Kaŭkazon kaj tie komencis labori por armenaj revuoj. Nun li loĝas en Paris.

Avelis Aharonjan skribis multe da romanoj, rakontoj, skizoj kaj cet. El liaj verkoj la Esperantistoj posedas kelke da skizoj en ĉi tiu aŭ alia Esperanta revuo, kaj unu rakonton „La patrinjo”, tradukitan de D-ro A. Fišer, eldonitan de „Danubo”.

En siaj grandaj verkoj Aharonjan priskribas la subpremegegan vivon de la armenoj, sub la jugo de Turkio. La alegorio „La izola arbo” estas unu el la plej satirindaj malgrandaj verkoj de Avelis Aharonjan.

Rim. de l' trad.

## Esperanto-ĥejo en Strasbourg.

Samideanoj de Strasbourg, urbo je grava trafikpunkto, invitas samideanojn ĉiujn Esperantistojn, pasantejn la urbon viziti la Esperanto-ĥejon, 17, rue de l'Al. Ĝi estas malfermata ĉiusekate je la 19-a horo. Sur la Reimponto Strasbourg-Kehl deoras Esperantista oficejo s-ano A. Schwarz, Esperantistoj pasantaj la ponton ne forgesu paroli kun li.

### Germanujo.

**Bonn.** La unua grupo de surdmulaj Esperantistoj en la mondo fondiĝis la 14-an de oktobro en Bonn. Sub la prezido de D-ro Rung el Koblenz kunvenis la surdmululoj de la urbo. Okazis demonstraĵo parolado de la s-oj Jahn kaj Butin el Godesberg kaj samtempe estis donata la unua leciono helpe de la interpretistino F-ino Weck. Oni poste fondis lokan grupon, al kiu aliĝis 30 gesurdmululoj. Monokoleto por la blindaj samideanoj donis ne malgrandan sumon. D-ro Rung fermis la unuan kunsidon skizante la vivon kaj morton de nia majstro, kies amo al la homaro estigis en li la ideon krei helpilon kaj interkomprenilon. La grupo „Amo kaj Helpo” posedas standardon Esperantan, kiu montras mezze de la stelo orolon trapiknitan per sago, do, bela kunigo de la emblemoj de la surdmululoj kaj de Esperanto.

### Nederlando.

**s-Gravenhage.** La 20. oktobro ekskurso estas aranĝita por aŭskulti radiotelefonan paroladon de s-o Merchan, farita en London. Komparu pri tio la ĉefartikolon de la hodiaŭa numero.

Raportoj pri la afero aperis en la loka gazetaro.

### Rumanujo.

**Bucuresti.** En la Evangeliana Liceo s-ano Siegmund Prager malfermis la duan Esp. kurson kun 30 partoprenantoj.

**Cernauti (Bukovino).** S-o majoro A. Hasenöhrl, agena del. de UEA, malfermis la 16-an de okt. la kvaran Esp. kurson en la Berlitz-lernejo. Fervore helpas en liaj laboroj s-o Kamillo Landmann, nova Esperantisto (str. Catedral 8).

**Ploesti.** La 21. de okt. vizitis ĉiujn ĉi urbon, centron de la rumana petrol-industrio, s-oj kapitano D-ro Josif, leŭtenanto M. Georgescu kaj Tiberio Morariu, sekr. de Esp. Centro Rum. en Bucuresti, por prepari kursojn publikajn. La gazeto Șăptămăna aperigis prop. artikolon de s-o St. V. Ionescu. La redaktararo de l' gazeto Știința atable proponis sian kunlaboron.

## Gazetaro.

Dürrenberger Zeitung, Keuschberg-Dürrenberg, Germanujo, 23. 9. 23, anonco kaj artikolo pri Esp.

De Avondpost, 3. 10. 1923, Hagoo, Anonco pri Esp.-kurso. Het Vaderland, 5. 10. 1923, Hagoo, Anonco pri Esp.-kurso. Ere Nouvelle, 2. 10. 1923, Paris, Esp. kaj la Societo de Nacioj. Travailleur des P. T. T., Organo de la Sindikato de Francej postoficistoj, Paris, en ĉiu numero enhavas internacian kronikon prete de Esp.

L' Index des Industries du Cuir, monata, oktobro. Artikolo pri la Litova Almanako.

Eclairer de l' Est, Reims, 25. 9. Artikolo pri la XV-a. Le Petit Méridional, Montpellier 3. 10. Pri servoj de UEA. Salzburger Volksblatt Nr. 206. Pri Nürnberg. Salzburger Chronik Nr. 216. Pri Nürnberg. Salzburger Wacht Nr. 304. Pri Nürnberg. Grazer Volksblatt, 14. 10. Esp. kaj L. d. N. B. Z. am Mittag. Pri radiotel. mencio de Esp. Dos Naje Lebn, Bialystok, 5. 10. Esp. kaj L. d. N. Nedela, Riga. Ilustr. gazeto kun art. pri Nürnberg kaj ilustraĵoj.

New Jersey Post, Town of Union, 29. 9. 6. 10. Notoj pri Esp.

Headway, Organo de la L. o. N. Union, London. Pri Nürnberg.

One and All, London, septembro. Pri Internacia koresp. kaj Esp.

Časopis Turisti, Praha. Pri mondturnismo kaj Esp.

Reichenberger Zeitung, Reichenberg. P. T. T. kaj Esp.

Reichenberger Zeitung, (aldono pri Tekniko), Reichenberg.

Tre det. art. pri ing. skribi kaj lingvo, mencio de help-lingvo.

## Socia vivo.

### La valuto-problemo en diversaj ŝtatoj.

#### Germanujo.

La ĥaosa stato de la germana valuto okupas jam de longa tempo ĉiujn oficialajn kaj privatajn rondojn. Pro la neebleco tuj eldoni orbazitan monon, oni decidis nun eldoni provizoran valuton valorkonservan nomatan „rentomarko”. Antaŭ ne longe speciala banko, krom la regna banko kun eldona privilegio, pro tiu ĉi celo estas fondita.

#### Danzig.

Ankaŭ ĉi tiu libera urbo suferas pro la valuto-mizero. La senato sekve de tio ĵus decidis la enkondukon de propra valuto, sendependa de la germana ĝis nun ankoraŭ validanta papermarko. Oni eldonos monunucon nomatan „guldeno”. Ĝi valoros 1/25 da angla funto sterlinga.

#### Latvio.

La gazetoj el Riga sciigas, ke Latvio estas faronta la unuan paŝon al argentina valuto. La korespondanta projekto estas jam pretigita kaj transdonita al la ministrara konfirmo.

Komence estas eldonitaj moneroj sole je 1 lato, sume 10 milionoj da pecoj, surbavantaj unuflanke la ŝtatan blazonon kaj la surskribon „Latvia Respubliko” kaj „1 lato” kaj la jaro-nombro dors-flanke.

### Familiaj budĝetoj de rusaj laboristoj.

Kiel vivas la laboristoj en Rusujo? Artikolo en Sociaj Informoj, la ĉiusemajna eldonaĵo de la Internacia Labora Oficejo, respondas al tiu demando. Ĝi donas ciferojn redaktitajn de la Moskva Oficejo de Laborstatistikoj sur la bazo de sciiĝoj pri 282 familioj de manlaboristoj kaj 73 familioj de oficistoj.

Manlaboristoj. En decembro 1922 ĉirkaŭ 90 procentoj de la tuta enspezo de familio de edzigitaj laboristo devenis el la laborgajno de la ĉefo kaj membroj de la familio. La resto de la enspezo venis el la vendo kaj interŝanĝo de posedaĵoj kaj nutraĵoj, el pruntoj kaj aliaj fontoj. La proporco de la salajroj al la tuta enspezo pligrandiĝis, kompare kun pli fruaj statistikoj. Ekzemple, en 1918 la salajroj konsistigis nur 65,5 procentojn de la enspezo de edzigitaj laboristo.

La financa situacio de la laboristoj multe diferencas de unu al alta industrio. Tiel, en decembro 1922, la enspezo de la familio de edzigitaj tabaklaboristo (58,57 antaŭmilitaj rubloj) estis preskaŭ la duoblo de tiu de la familio de edzigitaj tekstlaboristo (30,27 rubloj), kaj preskaŭ la trioblo de tiu de la familio de edzigitaj ĥemlaboristo.

Rilate al la elspezoj de edzigitaj laboristoj en decembro 1922, la jenaj ciferoj estas interesaj: luprezo, ĥejtado kaj lumigo: 12,4 %; nutraĵoj: 47,5 %; tabako kaj alkoholo: 2,1 %; vesiaĵoj kaj tualetaĵoj: 23,7 %; domajoj: 2,5 %; higienigo: 1,2 %; medicinalaj elspezoj: 0,6 %; edukado: 1,5 %; kotiz-ajoj al sindikatoj kaj al publikaj bezonoj: 4,8 %; diversaj: 4,1 %.

Oficistoj. Komparante la budĝetojn de manlaboristoj kaj oficistoj, oni trovas grandan similecon pri la sumo de enspezo kaj elspezo, sed

sian funebrojn kaj ploradon. Ĝi larĝe malfermis sian vundon al la ĉielo, plorante pro la grandega doloro kaŭzita per la morto de l' arbaro.

Pasis jarcentoj.

Tie, kie la vento estas senkatentigita kaj diskuras furioze, kie la ŝtonegoj ploras kun la ventegoj, jen, sur la ĉielatinga pinto de l' monto, kie por momento ripozas la laciĝintaj nuboj — persekutataj filinoj de la ĉielo, por murmuri malbenon al la ventoj; tie, kie nur sufero estas la kanto de l' naturo kaj la ĝemo de ĝia akŭso perdis en la brusto de l' senfinajo senresone, tie sola kaj izola ĝi staras, la funebra arbo. La rokojn farinte al si piedestalo, ĝi kvazaŭ foriginte ĝi sin ĵetas al la ĉielo, por interŝanĝi kisojn kun ĝi, kaj murmuris al la steloj pri la mistero de l' vivo, serĉas la solvon de l' granda enigmo de la ekzisto de l' fenomenoj, kaj jen per la tuta majesteco de antikva giganto sole remaĉas la doloron de la jarcentoj, sole suferas la naskodoloron de l' jarcentoj.

Kaj en sia izoleco ĝi estas potenca, la lasta bela kaj ne venkebla membro de la granda arbaro, la lasta restaĵo el la ekstermita raso.

Jaroj pasas post jaroj, ŝarĝataj per krimoj kaj sango. Ĉe la bazo de l' ĉielatinga monto volverpantas la dolora vivo, mordetante la teron kaj spuntante ŝaŭmon, ne trovante nomon por sia senfina sufero. Kaj la arbo restas tie, super la altegaj rokoj, kaj ankaŭ supre ĝi lulkantas siajn malserenajn meditojn kaj esperojn, siajn malnovajn memorojn kaj kredojn; ĝi tremas pro io malluma, kio pendas super ĝia kapo, ĝi tremas kaj vivas.

Kiel eterna gardisto, kiu ŝirmas la mondon de sur neatingebla altaĵo, — sur la pinto de l' monto la arbo sola kreskas kaj observas la vivon volverpantantan malsupre ĉe la bazo. Ĝi proreĝas kiam la mondo ĝojas, kaj ridas kaj ridegas kun la tromboj per libera, profunda rikano, kiam malsupre la malfeliĉaj homoj ĝemegas pro la sufero, sub la peza, fatala ŝarĝo.



grandan diferencon pri la proporcioj de la enspezoj devenantaj de diversaj fontoj, kaj pri la proporcioj elspezataj por diversaj celoj. La proporcio de la salajro de oficisto al lia tuta enspezo estas malpli ol ĉe manlaboristo, kaj la parto de lia enspezo devenanta el la vendo kaj interŝanĝo de posedataj kaj nutraj kaj el pruntoj estas pli granda. Ĝi estas fakte 15% ĉe edzigitaj oficistoj. Manlaboristoj vendas precipe eluzitajn vestaĵojn por pligi sian enspezon, sed oficistoj vendas ankaŭ librojn, meblojn kaj domojn.

La procentoj de la elspezoj de oficistoj por diversaj celoj estas la jenaj: Luprezo, hejtado kaj lukolo: 14,2%; nutraĵoj: 46,2%; tabako kaj alkoholo: 1,5%; vestaĵoj kaj tualetaĵoj: 19,5%; domoj: 1%; higieno: 1/4%; medicinaj elspezoj: 5,9%; edukado: 2,6%; kotizaj al sindikatoj kaj publikaj bezonoj: 3%; diversaj: 6,9%.

## Scienco.

### Meteorologio.

Tiu ĉi plej nova branĉo de la natursciencoj progresas malrapide. Richardson laste provis determini per matematikaj ekvacioj la veteron por la sekvontaj ses horoj, sed lia kalkulo mem daŭris pli ol ses horojn, krome ĝi entute ne estis ĝusta. Versajne li uzis nesufiĉajn ekvaciojn. Ne estas do versajne ke la veterprognozoj rapide preciziĝos.

M. J.

### Grandaj progresoj.

La germana scienca laboro konstatas du grandajn sukcesojn. Prof. Sienojn de la mondkonataj uzinoj de Zeiss en Jena sukcesis plibonigi la ultramikroskopon. Ĝis nun tiu ĉi instrumento ebligis efektiviĝi 10000-oblan pligrandigon de observata objekto. Per la azimuta diafragma li atingis 25000-oblan pligrandigon. Prof. Petersi perfektigis la diafragmon kaj la mikroskopon per la mikro-manipulatoro, per kiu oni en mikroskopa sfero povas piki kaj tranĉi per vitrofenestroj de 1/5000 milimetro.

## Tekniko.

### Teknikaj novaĵoj.

#### Telegrafono.

La telegrafono estas jam delonge konata. Per ŝtaldrato aŭ lameno oni povas je ĝi fiksi vivan parolon kaj poste reprodukti ĝin. Antaŭ nelonge kunfandigis la du akciaj societoj en Berlin „Telegraphon“ kaj „Telegraphon-Vertrieb“, kaj ili tiel perfektigis la telegrafonon, ke ĝi nun taŭgas por praktikaj celoj.

Per la aparato oni povas fiksi gravajn parolojn por posta kontrolo. Eĉ oni povas fiksi alvenantan parolon, se neniu estas ĉe la aparato. En la redakcioj do ne plu estas bezonata nokta oficisto; la telegrafono mem akceptas la noktajn novaĵojn kaj anoncojn.

Post serioza kontrolo la Germana Poŝta Ministerio permesis kontakti la telegrafonon en la germana telefonreto.

La aparato funkcias simple. Safirpinglo skribas la sonojn sur vakcilindron. Malgranda elektromotoro turnas la cilindron. Per premo de butono oni ekmovigas la motoron. La cilindro akceptas

Poste ekploras ŝtonego, laciginte por ventoj kaj uragano. La roko ploras per klaraj larmoj kaj kun senfina kiso, pendanta sur la lipoj de al maljunega patrino. Ĝi vibretas super la abismoj, kiuj estas ĝia tombo, kaj, antaŭ ol morii, ĝi rigardas supren al la izola arbo, ĝia maljuna kunulo, por demandi: ĉu ne tedis ĝin la malagrabaj ventoj, kiuj tie — supre — frapas kaj frapas senĉese. Morii kun kunulo estas pli bone: la ŝtonego serĉas por si mortkunulon.

La arbo majeste balancas la pinton: ne, ĝi ne estas tedita, ĝi enhavas en si multe da generacioj kaj grandan esperon.

Profunde kaj fikse enfosite en la tero, ĝi rigardas siajn idojn, la junajn arbojn kreskantajn ĉirkaŭ ĝi, kiuj ĉiuprintempe aperigas burĝonojn, junajn burĝonetojn, freŝajn kaj esperoplenajn, kiuj ridetas al sia avo.

Kaj la izola arbo atendas. Ĝi remaĉas la doloron de la jarcentoj, suferante la naskodoloron de la jarcentoj. Kaj la arboj alĝigas, alĝigas: tio estas la nova arbaro, kiu naskiĝas.

Tie, malsupre, en la abismo, la ŝaŭmorica toronto bojegas kaj ploras malgaje, batadas la ŝtonegojn por nehaliĝebla impulso, puŝadas antaŭen la ondojn unu post alia, kaj forfluas, por rakonti al la maroj pri la senfina doloro de la pasemaj fenomenoj, pri la sufero de tiuj, kiuj mortas ne vivinte aŭ vivas serĉante la morton.

Kaj la arbo restas supre, rigardas la arbojn kaj atendas. Ĝi sole remaĉas la doloron de la jarcentoj, sole suferas la naskodoloron de sia raso.

Ĝi estas la frato de la tromboj furiozaj; kun ili ĝi ploras aŭ bojegas al la mondo; kun ili ĝi verŝas frenezajn kantojn sur la dormetantaj montojn. Ĝi komprenas la dialekton de la tromboj, ĉar ĝi estas parenca je ili.

La nuboj prezentas ĉe ĝia pinto dancojn, kaj mano en mano forŝpire forkuras; la fulmoj stampas ĝin per flamaj kisoj, kaj ĉe ĝia bazo

parolon, kiu daŭras ne pli ol duonan horon. Per elektra ĉizilo oni povas renovigi la cilindron ĉ. 50-foje. Dum jaroj ĝi funkcias regule.

Josefo Major.

### Evoluado de la Francis-turbinoj.

Kiam la hungara fizikisto Segner planis la unuan primitivan turbinon, li ne supozis, kian altan rolon ĝiaj sekvantoj ludos iam en la moderna tekniko.

La turbino estas maŝino, kiu transformas la laborpovon de la fluanta akvo en mekanikan laboron. La akvon oni kondukas sub certa angulo en la rotaciantan parton de la turbino. La akvo pelas la padelojn de la rotacia parto. La esenco de la turbino estas do: transdono de energio pere de direktoŝanĝo.

La Francis-turbino karakterizas, ke la akvo estas alkondukata centripetale (de ekstere al la direkte de la akso) kaj forkondukata aksiale, t. e. paralele kun la akso.

Per la Fink'a akvoreguligo la Francis-turbinoj disvastiĝis sur la tero. La turbino venkas la vapormaŝinon (vapoturbino) kaj per tio demonstras, ke la rotacia movo estas pli moderna, pli konforma ol la ĉien kaj reen moviĝanta movo de la kranko-mekanismo. Dum la lasta tempo oni konstante malpligrandigas la pezon kaj pligrandigas la periodiferon de la turbino. Dum antaŭe la amerikaj firmoj konstruis pli modernajn turbinojn ol la eŭropaj, nun la lastaj ŝajnas esti pli progresintaj.

Tiamaniere estiĝis pere de la eŭropaj teorioj kaj amerika industrio tiu moderna maŝino. Tamen ŝajnas, ke novaj inventoj iom post iom faros grandan konkuron al la Francis-turbino.

Laŭ Hungara Natursciencita Revuo  
Jos. Major, Budapeŝt.

## Internacia trafiko.

### Ŝipveturado.

#### Siberia marvojo.

La nova provo maraŝingi Siberion, kiel sciigas la rusaj gazetoj, plensukcesis. La ŝipoj de Karsk'a ekspedicio sukcese atingis Uŝijort'on (haveno ĉe la enfluo de la rivero Ĵenisej en la Glacian Oceanon). Post transŝarĝo de la varoj, parto de la eskadro — la plej malgrandaj ŝipoj — akompanataj de la riveraj, ekveturis al Krasnojarsk (urbo ĉe la granda siberia fervojo).

Kvankam la importitaj varoj relative estas ne multaj (estas menciinde, ke la ekspedicio alportis la mankintan plenan instalaĵon por konstruita jam antaŭ 3 jaroj grandega sapofarejo), tamen la sukcesinta entrepreno estas refoje pruvanta la ebligon de la siberia marvojo, havanta grandan ekonomian signifon por la progreso de vastega lando kaj ĝia naskiĝanta industrio.

La alvenintaj ŝipoj (la malgrandaj) restas en Siberio, renovigante ĝian riveran ŝiparon. La ekspedicio estis aranĝita de siberia „Centrosojuz“ t. e. Unuiĝo de Kooperativoj. R. L.

### Aerveturado.

Franca societo malfermos aerspoŝton Basel-Luxemburg tra Strasburg kun daŭrigado al Bruxelles kaj Antwerpen kaj eble ankaŭ al Nederlando kaj Anglujo.

dispecetigas la ŝtonegojn. Super ĝi flugadas senmombraj generacioj da agloj kaj mortadas vivinte ĉirkaŭ si la nubojn kiel mortotukon. Kaj la arbo restas tie daŭre, fortanima kaj izola.

Ĝi sole remaĉas la doloron de la jarcentoj, sole suferas la naskodoloron de sia raso, kaj el ĝia akuso naskiĝas kaj grandiĝas novaj germetoj.

Kaj kredas la arbo, kaj atendas, ke la arbaro leviĝos el sub la tero, ke el la tomboj elrevikiĝos la vivo, ke la nudaj randoj kaj brusto de la dezertaj montoj pompe reornamiĝos.

Kaj kiam venas la furiozaj ventoj, por deŝiri la junajn branĉojn per ruĝiga frapo, aŭ proksimiĝas paŝtisto kun sia brutaro, por piedpremi la kampon de la espero; kiam en malnova nokto kun bojego la lupoj forkaptas unu de alia la abomenan ĉasajon kaj dum la sanga batalo subpiedigas kaj forŝiras la junajn arbojn, — la izola arbo subite forte balanciĝas, kortuŝe ekknaras, kaj denove super la altaĵoj aŭdiĝas ĝia dolorenhava ĝemo: „hail! hail!“

La malnova vundo malkovriĝas je sia tuta larĝeco kaj profunde, la arbo denove ĝem-p-loras elkore, la gutoj ruliĝas jen ruĝaj kiel kora sango, jen klaraj kiel la larmoj de funebraanta virgulinio. La izola arbo tremas por la mortantaj vivoj, pro ilia doloro ĝi ploras kaj verŝas sangolarmojn.

Kaj ĝia krio estas flimiga; por ĝi la mallumo vibras, la montoj skuigas pro teruro; premante la vostojn inter la kruojn kaj mallevante la kapojn, forkuras la bestoj, rapidas, por sin kaŝi; la paŝtisto faras krucoŝignon pro fimego, kovras la vizagon per sia eluzita aba-o<sup>3)</sup> kaj forrapidas malsupren. Kaj la junaj arboj denove leviĝas kaj ridetas al sia maljunega avo.

Kaj la arbo atendas, la arbo kredas . . .

<sup>3)</sup> aba-o = longbaska kaŭkaza vesto por viroj.

## Statistiko.

### Polujo.

Oficiala statistiko sciigas, ke Polujo sur teritorio aljuĝitaj per traktatoj de Versailles kaj Riga, nombrantaj 395 000 km<sup>2</sup>, enhavas 27 milionojn da loĝantoj, kaj ke Polujo okupas la sesan lokon inter la eŭropaj ŝtatoj.

Laŭ nacieco la loĝantaro de Polujo dividiĝas jene: Poloj 68 proc., rutenoj 15,5 pr., hebreaĵoj 7 pr., germanoj 4,5 pr., blankrusoj 3 pr., rusoj, litovoj k. a. 2 proc.

## Komerco.

### Esperanto ĉe Komerca Ĉambro.

„Espero“ Komerca Societo en Bucuresți ricevis leteron de la Komerca kaj Industria Ĉambro de Budapeŝt en lingvo Esp., kiu fakte pravas, ke tiu komerca ĉambro enkondukis la uzadon de nia lingvo en sia korespondado kun la eksterlando.

## Foiroj kaj Ekspozicioj.

### La foiro en Niĵni-Novgorod.

kiel raportas soveta gazeto, rezultigis negocojn je 260 000 000 da oraj rubloj. Ĉirkaŭ 4 milionoj da pudoj de komercaĵoj estas aĉetitaj resp. venditaj ne enkalkulante grandegan kvanton da menditaĵoj ekspeditaj deloke.

## Filatelo.

### Novaj poŝtmarkoj en Estonio.

Okaze de reorganizo de aerspoŝto en komenco de oktobro estas eldonita nova serio. La antaŭaj triangulaj poŝtmarkoj ricevis surprisojn je 5, 10, 15, 20 kaj 45 markoj. L-on.

## Internacia sporto.

### Velflugado.

La gazetaro raportas, ke la unua senmotora velflugo en Polujo okazinta antaŭ nelonge en la ĉirkaŭaĵo de Novy Torg en la Taira-montaro, estas malsukcesinta.

Pro malfavoraj ventkondiĉoj la plimulto de la aparatoj estas dispecigitaj. La plej sukcesa flugo daŭris nur 3 minutojn.

La gazetaro sciigas plue, ke la unua velflug-semajno en Aŭstrio okazis la 14—21. okt. sur la Hundsheimer'a monto en Deutsch-Altenburg.

La velflugojn, krom la multnombraj aŭstriaĵaj societoj kaj rondetoj, partoprenis ankaŭ la famaj germanaj velflugistoj de Rhön.

## Diversaĵoj.

### Aktuala matematiko.

Kiel multo alia ankaŭ la nombroj falegis malsupren el respektinda alteco. Dume en kelkaj landoj en Eŭropo, ĉefe en Germanujo, la ŝtataj budĝetoj montras nombrojn ne en milionoj kaj miliardoj, sed eĉ jam en bilionoj kaj trilionoj, nur malmultaj personoj eble imagas la veran aspekton de tiaj nombroj.

Sub ĝi turmentiĝas la mondo, funebraj kaj vivas.

Ĉiusemajne, rampante kaj gratante la teron, sin trenas supren al la monta pinto mizera karavano de suferantaj homoj, alportante al la arbo la ŝarĝon de siaj doloroj. Kelkaj el tiuj homoj havas ĉe si malsanulon aŭ suferantan koron, kelkaj havas zorgon ne sciante ĝin forigi, kelkaj ekamis kaj sopiras esperon. Kaj ĉiuj tiuj malfeliĉuloj kaj spirital-anuloj, ĉiuj tiuj en mallumo suferantoj — kies animoj ploras kviete kaj serĉas esperon, — kiel malsana infano serĉas sian parinon, — ĉiuj tiuj rifuzitoj de la vivo, ĉiuj tiuj maldolorotitoj de la sorto, gratante la ŝtonegojn kaj lekante la teron, kun larmoj en la okuloj kaj fajro en la koroj, — iras, atingas la izolajn arbojn kaj petas rimedojn kontraŭ siaj doloroj.

Kun tremantaj manoj ili alligas al la branĉoj de la sankta kaj miraklofaranta arbo pecojn de siaj vestoj, eluzitan ĉifonon, kaj kune kun ĝi — malluman peceton de siaj animoj, afliktitan, harditan pecon.

Ili ĝenufleksas antaŭ la arbo kaj surverŝas ĝiajn radikojn per maldolĉaj larmoj. La izola arbo ploras kun ili per siaj sango-larmoj kaj en la afliktitajn suferantajn korojn enspiras iomete da kredo, da espero por la vivado.

Kaj la homoj malsupreniras de sur la sankta altaĵo, por porti denove la pezan ŝarĝon de sia vivo, paciĝinte je la neevitebla sorto. Kaj ilia mizera vivo iomete ekbriletas, kaj la spirital-sanula vivo ne ŝajnas pli sensenca. La espero je bona estonteco savas ilin.

La izola arbo restas sur la altaĵo. Ĝi sole remaĉas la doloron de la malfeliĉuloj, sole suferas la naskodoloron de la vivo, kaj ĉirkaŭ ĝi leviĝas, alĝigas la nova arbaro.



La bildo estas la jena:

Table with 2 columns: unit (miliono, miliardo, biliono, triliono, kvadriliono, kviniliono, sestiliono, septiliono, oktiliono) and value (1, 10, 100, 1000, 10000, 100000, 1000000, 10000000, 100000000).

Tiu ilustraĵo tamen ne jam montras la ferucecon de la aludita nuleco. La sekvanta tabelo montras tion pli evidente:

Table with 2 columns: unit (miliono, miliardo, biliono, triliono, kvadriliono, kviniliono, sestiliono, septiliono, oktiliono) and value (1000000, 10000000, 100000000, 1000000000, 10000000000, 100000000000, 1000000000000, 10000000000000, 100000000000000).

Bibliografio.

Libroj.

Albumo de la bulgaraj Esperantistoj. S-o Atanas D. Atanasov-Ada (Sofia, Oboriste 44) estas malnova bulgara Esperantisto, kiu distingigis kiel senlaca kaj persista pacbatalanto. Filologo kaj gimnazia instruisito, tre lerta polemikanto, li deposti jrooj okupas la posteno de vicprezidanto de la B. E. Societo kaj redaktoro de B. E. Jam du lernolibroj estas de li verkita. Ĉi-tiu jaron li kronigis sian produktadon per la supremecita albumo. Ĝi estas originala portretadrosaro de preskaŭ 350 verdstanoj. Vera monumento de niaj esintaj kaj nuntaj pioniroj ĝi estas trege grava ne sole por la bulgaroj, sed ankaŭ atentinda por la ceteraj samcelanoj. Trafolante oni ricevas tute alian impreson ol legante laŭliteran nomadresaron. Longbarbulito estas vicigita kun infano, ekmsiminto okupas la saman spacon kiel suisto, muelisto; abundas diversaj uniformoj, strangaj mienoj, tutaj familioj, grupoj. Kia bunta kaj detala bildo de landa Esperantistaro! Ĉiu nomo estas vivigita, ĝi parolas pri fervoro kaj sindono.

Ĝi estas ilo por propagandistoj, la albumo farigas necesajo por korespondemuloj. Konsiderante la malfacilan preskondiĉojn en Bulgario la prezo de 30 levoj (ukusa eldono 50) estas tre modera. La baldaŭna eltercon certe sedkvo pli plena adresaro.

Gazetoj.

- Holandaj Esperantistoj, Zutphen, n-o 92, 93, 94. La Movado, Paris, IX, n-o 1, 6a jaro. Anoncas sian reaparon. France Esperanto, Paris IX, n-o 20 (44) aŭg. sept. La Interligo de l' P. T., Paris XVII, n-o 12. Tre leginda enhavo por fakanoj. Golden Age Esperantist, New York City, n-o 2. Organo de la Biblio-Studantoj, granda parto en angla lingvo. The British Esperantist, London W. C., oktobro. Marto, Haida, oktobro. Impresa kajero. Germana Esperantist, Berlin SW 61, oktobro. Kun detala kongres-raporto (kial en Esperanto kiel germ. prop. organo?). Esperantista Junularo, Baugé M. & L., sept. okt. Bulgara Esperantist, Sofia, oktobro. Esperanta Ligilo, Stockholm, oktobro. La Federacio de la Mondo, Fremantle, Aŭstral., septembro. La Lumturo, Bremen, 15. 10.

Grava traduko en Esperanto.

Pastroj A. L. Curry, F. B. E. A. kaj Ashley kune laborante ĵus finis la tradukon de la ĉefa verko de William Shakespeare, "Reĝo Lear", unu el la plej ravaj dramoj en la tutmonda literaturo. Oni presigos la libron bonstila kaj certigas vin ke ĝi estos ĉiel inda de la grava verko enhavata.

La prezo post eldono estos 2/5 aŭ 3 s. Sed por ke ni fidplene entreprenu la eldonon de la libro, ni invitas antaŭajn mendojn je malpli alta prezo: — 2.25 ŝilingoj, afr.

Ni nur akceptos tiun prezon de tiuj kiuj mendos la libron antaŭ nia presdato, kiu kredeble estos la 12. okt. (Ekster-eŭropanoj legu 30. nov.) 1923. Ĉiukaze la antaŭmendantoj devas sendi la monon kun la mendo.

Oni sin turnu al s-o Pastro A. Ashley, The Vicarage, Farnley Dyas, near Huddersfield, Anglujo.

Nur nun ni ricevis la senditan al ni presajon, kiu verŝajne pro malfunkcio en poŝto eraris. — Red.

Parolejo.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiaj sciigoj, informoj, kritikoj, liberalaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin ĉiun respondecion pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi netaŭgajn artikolojn.

229. Pri korespondado. (Rilatas al 210.)

Sinjoro Cossutta estas prava, ke nur malmultaj Esperantistoj respondas al la ricevitaj skribaĵoj. Ankaŭ mi ĵus devis konstati. Ĉu oni ne povus almenaŭ unufoje respondi al la senditoj kaj sciigi al ili, kial oni ne volas korespondi kun ili? Eble ĉar ili faris tro multajn erarojn en sia skribaĵo, aŭ ĉar ili deziras havi poŝtmarkojn kaj aliajn objektojn. Sed ankaŭ ĉi alian oni povas timarki. Trovinte Esperantistojn, kun kiuj oni vigle korespondis kaj interŝanĝis malgrandajn objektojn, oni devos konstati, ke post kiam oni sendis tre valoran sendaĵon, la ricevinto ofte ne plu respondas. Mi ekzemple havis tre viglan korespondadon kun itala samideano, al kiu mi sendis malgrandajn objektojn. Mi ankaŭ ricevis malgrandajn objektojn de li. Sed post kiam mi estis sendinta tre valorplenan sendaĵon en rekomendita letero, mia korespondanto ne plu respondis. Mi skribis ankoraŭ kelkfoje al li ĉar mi pensis, ke eble la sendaĵo estas ŝtela, sed sen sukcesoj. Estis al mi tre interese scii, ĉu li ricevis

mi an sendaĵon, aŭ ne. Mi tial komisiis la poŝtoficejon esplori, ĉu mia rekomendita letero atingis lin kaj ĉu oni transdonis ĝin al li. Post unu monato la poŝtoficejo sciigis al mi, ke mia letero estis alveninta kaj transdonita per la poŝtoficejo.

Estas kompreneble, ke lernantoj, se ili fin aŭdas, perdas la emon lerni Esperanton. Por malamikoj de Esperanto tio estas fakto por kontraŭbatali Esperanton. Estus tre dezirinde, ke tiaj statoj malaperu el la korespondado sfero.

Georg Müller, Weissenborn (Germanio).

Abon-Tarifo.

(Germanujo).

Akceptinte abonojn por la monato novembro, la germana poŝto kalkulis malnovan, ne plu validantan ŝlosinombrom (1,7 miliardo) anstataŭ la nova (18 miliardo). La ĉiam pli kaj pli akriĝantaj cirkonstancoj en Germanujo sekve de tio devigas nin peti de niaj germanaj poŝt-abonantoj por novembro

postpagon de 15 miliardoj da markoj al nia poŝta ĉekkonto 75102 Köln, T. & H. Jung, Horrem, ĝis 6. novembro 1923.

Ne postpagitajn abonojn ni devos ĉesigi post tiu ĉi dato aŭ rezervi al ni la fikson de pli alta sumo.

Negocaj informoj.

Kolektantoj kaj interŝanĝantoj ĝenerale deziras konati ĝi al sia korespondanto. Tiucele oni ofte interŝanĝas fotografiajn. Ili tamen estas tre multekostaj kaj ofte malfacile sendeblaj en malproksimajn landojn. Por forigi tiujn malfacilaĵojn s-o Franz Christoph, Wien V, fabrikas Esperanto-glumarkojn kun bildo, nomo kaj adreso de la koncerna persono: ili estas tre bone faritaj kaj tial rekomendindaj al la gesamideanoj. Ni atentigas pri la reklamo sub „Anoncetoj“.

Novaj Tempo! Fidon al Paco al Progreso. 12-paga monata gazeto pri popoledukado. Oficiala organo de Tulumonda Asocio de Gelnstruloj Esperantistaj (decido en Njrbreg). — Abonprezo — jare: 1/3 de meza tagsalajro por ĉiu lando. — Peli specimenoj: M. Goldberg, Klemmsr. 14 p., Leipzig-Co.

Jus aperis

„La Reĝo Judea“

Dromo en 4 aktoj kaj 5 bildoj. El rusa lingvo tradukis V. Deyjatnin. Esperantan tekston trarigardis magistro de teologio kaj akademiano prof. A. Dombrovski. — Rekomendita de Esp. Lit. Asocio. Dua eldono, 182 pag. 13x18 cm. Prezo broŝt. 2.25 sv. fk, bind. 2.75 sv. fk. plus 0.50 sv. fk. sendkostoj. Por revendistoj rabato.

„La Reĝo Judea“ estas verkita de anonima, tamen tre konata, eminenta rusa poeto, sin kaskaŭta sub litero „K. R.“ La verko estis ludita en Rusujo, en la imperiestraj teatroj antaŭmilite. — Ĝi estas tradukita en sep lingvoj. — La eldono, presita en Dresden (Wilm. Lippert) havas elegantan eksterajn kaj estas sen preseraroj.

Mendu ĉe la eldoninto

P. Medem, Kaunas Smeliu g. 12 (Litov.)

IDOJ DE ORFEO. La tre interesa romano, originale verkita en Esperanto de H. J. Bulthuis, rekompeniata de la Akademio 1923, estas havebla en: Anglujo ĉe: Brita Esperantista Asocio, 17 Hart Street, London W. C. 1. Belgio ĉe: Belga Esperantisto, dir.: s-o F. Schools, 45 Kl. Beerstraat, Antwerpen. Finnlando ĉe: Esperanto-Oficejo, 20 Kasarminkatu, Helsinki. Francujo ĉe: Esperantista Centra Librejo 51 Rue de Clichy, Paris (9). Nederlando ĉe la ekspluatanto: CENTRA ESPERANTO-LIBREJO, 2a Bankastr. 's-Gravenhage.

La nova eldono de

BES-a Adresaro

jus aperis.

Prezo: 1 svis. franko. Duona prezo por malbonvalutuloj.

Mendu ĝin senpere ĉe

Butin & Jung, G.m.b.H., Esperanto-Eldonejo Godesberg (Germanlando) Bahnhofstrasse 30, Poŝtĉeka konto Kbn 920 36.

FARU REKLAMON en ET!

Anoncetoj.

FIANCIGO. F-ino Aime Jacobs kaj s-o Doef van Westmael en Gent, fervoraj geesperantistoj, fianĉigis.

PETEGO! Juna, familian havanta samideano, kiu iam de jaroj estas sanganta, pulmmalsana kaj de pli ol jaro ne laboras, petas noblakoran samideanojn kaj societojn per ia ajn donaco helpi lian sanigon kaj mizeron. Jeno Török, Szombathely, Hungario, Templomter 5. [2]

NI VOLAS DISVASTIGI ESPERANTON inter ne-esperantistoj. Pro tio ni aranĝos letrespereson la 28. novembro. Helpu nin bonvole! Se eble ĉiuj ricevos almenaŭ il. pk. n. Signu L. V. kaj adresu al F. Ahnfeldt, Torskers, Svedujo. [2]

SAMIDEANO EL ALIKSNE, sendinta al mi ET-numerojn kaj forgesinta nomi sur la banderolo sian adreson, bonvolu ĝin al mi konigi. — Włodimierz Pfeifer, Księgarnia Fiszerska, Łódź, Polujo. [2]

EKSTERLANDAJ ESPERANTISTOJ! Juna germano 24 jara (instruisto) intencas elmigradi eksterlandan plej volonte al nederlanda Hindio (Sumatra, Borneo, Javo). Kiu povas anonci iun ajn oficon al mi tie (kiel laboristo teknika aŭ kampara, aŭ komerca aŭ kiel oficisto en profesia pozicio). La ŝipveturkostoj mi perlaboras fide. Ofertojn al s-o Willy Weillepp, Kötschau apud Kortheia, Germani. [2]

KOMERCISTOJ! Mi deziras interrilati kun eksterlandaj komercistoj pri eksporto (speciale maŝinoj kaj industriaj) kaj importo; akceptas peradojn; serĉas reprezentantojn. Wilhelm Klänke, komercisto, Peterheinsstr. 50, Nürnberg (Germanujo). [1]

KIO DORMETAS EN VI? Sendu al mi vian naskiĝadaton, profesion, iom da skribaĵo de vi kaj 1.50 sv. fk. aŭ egalvaloran, kaj mi diros al vi, kion vi povos atingi en via vivo. Grafologo H. Chlubna, Wien V, Storkgasse 12. Sendu rekomendie. [1]

KOLEKTANTO! Por 100—1000 pm. el ĉiu lando mi sendas la saman kvanton de Germanujo. Mi havas grandan kvanton da pm. Mi ankaŭ korespondas kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Mi sendas kaj skribas iuj kaj ĉiam. Mi ankaŭ interŝanĝas papermonon. S-o Rich-Wluka, Bernstadt en Schles, Junkernstr. 5, (German.) [1]

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Filatelistoj! Kiu sendos al mi 50—100 diversajn poŝtmarkojn de sia lando, al tiu mi sendos samkvanton da ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj. S-o Jan Mohapl, faka instruisto, Olomouc-Hodolany, Ĉeĥoslovakio. [2]

Mi deziras interŝanĝi pm. el Italujo kaj kolonioj kun samideanoj de ĉiuj landoj. S-o Danove Giuseppe, Via Casaregia 28/6, Genova (Italujo). [2]

Botanikistoj. Otto Fiedler, Leipzig, Gohlis, Cöthnerstr. 12 III, (Germ.) deziras interŝanĝi sekigitajn plantojn. [2]

F-ino Jeanne Somers, Nyverheidstr. 17 en Antwerpen, Belgujo, proponas al samideanoj (inoj) de la tuta mondo, sendi serion da il. pk. aŭ kopioj de pentraĵoj. Ŝi resendos samvalorajn. (Afranku bildi.) [2]

Azianoj, precipe anamanoj, siamanoj kaj tibetanoj! mi deziras korespondadi kun vi. Ankaŭ kolektas gazetojn en aziaj kaj afrikaj lingvoj kaj indigenaj l. de Ameriko kaj Aŭstralio. Gazetoj kompensataj per verko „La malbonaj flankoj de sporto“. Sur rango de sendata gazeto notu la nomon de ĝi, de ĝia lingvo kaj la nombron de literoj en notata lingvo ekzistantaj. J. Vahikeri, Luise i. 5—11, Tallinn (Estonujo). [2]

S-o Nik. Donien, Friedrichsthal (Saarteritorio), Moltkestr. 10, deziras l. kaj pk. pri politiko, socia vivo kaj Esperantismo, nur kun lertaj gesamideanoj. [2]

S-o Antonio Sehler, Bruch 288 apud Brüx (Ĉeĥoslovakio) korespondas kun ĉiuj landoj per il. pk. pm. Respondo certa. [2]

Filatelistoj! Mi vendas 25 ekz. malsamajn pm. el Finnlando, fmk. 10.— kaj 100 diversajn fmk. 30.—, S-o Paavo Laaksonen, Punavuorenk. 22, Helsinki, Finnlando. [2]

F-ino Marie Hanusch, Trautenau, Kirschengasse 21, Bohemio (Ĉeĥosl.) deziras korespondadi kun la tutmondo per il. pk. [1]

800—200 pm. nedifektajn de mia lando ricevos tiuj, kiuj sendas al mi la saman kvanton de si landaj. S-o Eugen Wildfeuer, Levoča, Spiš, Ĉeĥoslovakio. [1]

S-o Béla Juki, X Hölyg-u. 48. Budapest (Hungario) deziras trovi konstantajn korespondantojn el la tuta mondo, precipe fraŭlinojn, il. pk. Esperante kaj franclingve. [2]

Mi deziras interŝanĝi pm., pk. kaj papermonon. S-o Isak Czerny, Ogrodowa 25, Warszawa, Polujo. [1]

S-o Démétrius Ioannides, P. B. 98, Port Said (Egiptujo), deziras korespondi pri filologio, filozofio kaj ĉiaspacal temoj pri belaj artoj kun geamikoj de ĉiuj landoj per il. pk., l. gaz., revuoj, libroj kaj malofaĵoj. Li ĉiam respondas. [1]

S-o K. de Witte, Radstakerweg 28, Deventer, Nederlando, deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj per il. pk. kaj l. [1]

S-o A. Hamelink, Rembrandtstr. 71, 's-Gravenhage (Nederlando) deziras korespondadon kun gesamideanoj el tuta mondo per pk. il. kaj l. [1]

S-o J. Van den Steen, Staatsnormaalschool 8, Gent, Belgujo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo. [1]

S-o Ludoviko Hiob, Estonio, Valk, Voru tanav n-o 22, deziras interŝanĝi pm. kaj korespondadi per il. pk. kun Ameriko, Azia, Afrika, Aŭstralaj landoj, kun Rusujo (Kaŭkazo, Siberio, Turkuo kaj Islando). [1]

Fraŭlo Ludoviko Hankowetz, oficisto, Ciocrac 29, Braŝov (Rumanujo), Transilvanio, deziras korespondadi per il. pk. kun la tuta mondo. [1]

Sendu unue 100—200 purig. nedifekt. pm. kontraŭ samkvanton aŭstr. (escepte Germ.) Pension Esperanto, Wien, Argentinierstr. 55 (Aŭstrujo). [1]

Pri aerveturo, aerveturaj aferoj kaj pri fonda de Internacia aervetura Ligo kun ĉiutandaj specialistoj kaj interesuloj, deziras korespondi en lingvoj Esperanta, Franca, Rusa, Germana kaj Bulgara s-o St. St. Djudjev, str. Pirotska 48, Sofia, Bulgario. [1]

Filatelistoj! Por 2 svis. fk. aŭ egala valoro mi sendas 50 div. malofajn poŝtmarkojn de la liberŝtato Danzig interŝanĝas pm. Oskar Köhler, Ölsnitz i. Vogli, Bergstr. 3. [12]